
# L'ALVOKO




OFICIALA ORGANO
DE LA KEBEKA ESPERANTO KLUBO NO: 11
29 JAN 1964.

## KUNVENO ĈE TRIRIVEROJ

Lastan monaton veturis Tririverojn malgranda grupo de la Kebeka Esperanta Asocio. Ni estis la gastoj de la samideana Klubo de tiu urbo. Ties la membroj unuiĝas por celebri la 100an datrevenon de nia eternegloria Zamenhof. Tiu kunveno estis granda sukceso. Post la bonega vespermanĝo ni aŭskultis kun plezuro la interesan prelegon de la afabla S-ro De Kinder, kiu parolis pri la mondlingvo kaj mondfama fondinto.

Post la prelego, ni aŭskultis nian amikon, juĝisto Deshaies, kiu pliboniĝas en la Zamenhofa lingvo. Ni ankaŭ havis la plezuron aŭskulti la S-ron Ronald, kiu flue parolas la esperantan lingvon.

Dum la vespero, ni dancis, trinkis, kaj babilis kun niaj bonkoraj geamikoj de Tririveroj.

En la nomo de la Kebeka grupo, mi volus fundkore danki tiujn bonaja amikojn por ilia gastigado kaj por la ĉarma akceptado, sen forgesi ilian bonvenan inviton; ni esperu baldaŭ kunveniĝi.

S-ro Eugène Melanson.

## L'ARTO RESTI JUNA

Unuan sulketon, unuajn blankajn harojn ..... rapidan kalkulon... Jam! Kaj subite vi sentas ŝarĝon sur la sultroj. Ha! Kie estas la sekreto de la eterna juneco? Ne ankorau oni malkovris la junecfontanon. El de, ke la mondo estas mondo, la homaro serĉas ĝin.

La progreso jam plenumis multe da belaĵojn; la meza dauro de la homa vivo antaue estis kvardek jaroj, sed de post duojarcento, ĝi nun pli-dauriĝis ĝis sesdek-kvin jaroj.

De tempo al tempo la scienculoj aperuciĝas bonaugurajn faŭrerojn. Kiam oni demandis al Socrato la sekreton de lia forto, li respondis "Ciutage mi provas lerni ion novan". Tio estas, kiam oni ne interesiĝas pri nenio, ke oni komencas maljuniĝi.

Nia menso neniam maljuniĝas se ni inteligentmaniere serĉas okupi nian ekziston. La sukcesa laboro kuraĝigas kaj ekzaltas. Ni timu konkurencon. Ni serĉu ĉiam en nia laboro novan intereson. Ni adoptu ŝatokupon (lerni esperanton), kion ni estos felicaj retrovi en niaj momentoj de libertempo. Ni donu al ni precizan celon kiu alportos siavice la viudeziron. Okdek-kvarjara Patro Sertillanges, kiu komprenis treegan junecon de la spirito kaj de la koro, volonte elkonfidis sian sekreton al ĉiun, kiuj pri lia viveco miriĝis: "Mi ĉiam havas ion ŝati, ion projekti, ion fari, kiam mi finas unu laboron, jam unu alia estas komencita.

Ni gardu nian spiriton scieman, entuziasman. Ni firme tenu nin en la movada. Ni vivu kun nia tempo, ni regardu antauen. Tio estas menskutimo por preni. La enuetoj, la senĉesaj kvereletoj eluzas pli ol la grandaj ĉagrenoj. La maltrankvilo estas tiel elsuĉa por la nervoj kaj la muskoloj kiel dura fizika ekzerco.

Ni interesiĝu al ĉiuj, kiuj ĉirkaŭas min, ne laŭ la mezuro, kie ili povas helpi nin, sed kontraŭe laŭ la mezuro kie oni povas helpi lin. Ni vivas per niaj pensadoj. Ni estas maljunaj aŭ per ampekto aŭ per aktiveco, kiam ni konfesas, ke ni estas. Spirito kaj karaktero estas la du grandaj kontraŭdiroj al la leĝo de l'aĝo kaj ekfiniĝo.

Ni pripensu al tiu ekspritaĵo de Clémenceau: "Kiam oni estas juna, tio estas por la vivo".

S-ino L. Hardouin

**Ni estas felicaj:**

Ni gratulas S-ino Cécile Lachance por la bela nomado kiel prezidanto de la Mikologia Asocio. Ni estas feliĉaj pri tiu nomado kaj dezirespimas niajn plej bondezirojn da sukceso al S-ino Lachance.

**Ni bedauras:**

Niaj sinceroj kondelencojn al S-ro Henri Brunelle pri la morto de sia frato, S-ro Wilfrid Brunelle el St-Pamphile, L'Islet, kiu okazis je la 26a de Novembro 1963.

## MIRINDA KEBEKO

KEBEKO: urbo, kie oni vivas feliĉe; urbo, kiu ŝatas akcepti siajn vizitantojn! KEBEKO, ni sentas vian koron bati, tiun koron grandegan! Iu sekreto loĝas en via koro! .... Vin viziti estas vin adopti!

KEBEKON oni ĝuste povas nomi la subĉiela Panteono de la Nordameriko, pro ĝiaj multnombraj monumentoj. Fakte la turistoj estas allogataj de ĉie pro la franca karaktero de la urbo. Fondita de Champlain en 1608, la malnova ĉefurbo, staranta apud la majesta riverego Saint-Laurent, prezentas multe da ĉarmoj al la turistoj. Inda kaj fiera pro sia historio, pro sia Citadelo, siaj batalaj Kampoj, remparoj, klifoj, mallarĝaj stratoj, malnovaj domoj kaj preĝejoj kaj pro siaj historiaj lokoj, KEBEKO allogas pli kaj pli multnombrajn vizitantojn. La latina kvartalo, kun siaj mallarĝaj kaj pitoreskaj stratoj, ĉiam ravas la turiston avida pli bone koni la malnovan ĉefurbon.

La konstruaĵo de la Parlamento estas rimarkinda pro la stilo. La Citadelo estas kunmetita de kelkaj rimarkindaj masonaĵoj. Tiu Citadelo, kiu kronas nian urbon, faras ĉi tiun tre pitoreska. La turistoj multe ŝatas promeni piede au kaleŝe ĉirkau la historia teraso Dufferin, proksime al la Kastelo Frontenac. Murego ĉirkaŭas la plej malnovan parton de la urbo. Oni retrovas la malnovan kapelon Notre-Dame des Victoires kuŝanta je la malsupra urbo; estas la unua preĝejo de KEBEKO. KEBEKO estas urbo, kiun oni devas koni, ĝiaj malnovaj monumentoj kaj muzeoj, kaj sonoriltuoj estas plenaj da sekretoj.

KEBEKO, ververe, allogas turistojn el ĉie, precipe pro sia franca karaktero. La kulturaj okupoj estas tre prosperaj, kaj ili tre ekflugas. Multnombrajn koncertojn ĉiuj tre ŝatataj oni proponas al la publiko en tipe kebekaj kadraĵoj. Pentrartaj galerioj kaj diversaj ekspozicioj ĉu literaturaj, ĉu artistaj, same kaptas indan atenton. La malnova ĉefurbo ĝuste fieriĝas estigi sian propran operon, kies famon oni ne plu devas elŝovi.

En KEBEKO, la vivo estas brilanta, ĝoja kaj tre aktiva. Autune ĝi surmetas belbrilegon kiu neniam elreviĝas. Paroli pri KEBEKO estas elvoki ĝian famkonatan vintran karnavalon. La turisto estas scivolema vidi ĉion kio okazas en nia urbo dum la karnavalo parado: tiuj mil koloroj multe superas la atendon de la vizitantoj. El ĉiuj partoj de nia lando, de Usono kaj eĉ de aliaj kontinentoj, entuziasma homamaso rapidiĝas partopreni ĉiujare la karnavalajn manifestadojn.

Kompare kun aliaj lokoj de nia lando, KEBEKO estas la plej interesa Kanada urbo por turismo. Ni vin kuraĝigas viziti nian urbon tiom bela. Do, karaj turistoj, ne hezitu: venu al KEBEKO. La kora kaj simpatia akcepto de la Kebekanoj ekflamigos viajn korojn serĉante pli koni tiun lulilon de la franca kulturo en Kanado.

Lernantoj de la K.E. - unua grado.

## NI ANKAU GRATULAS

Ni gratulas F-ino Michèle (Miquette) Doré pri sia fianĉiĝo kun S-ro Gilles Guérin, kiu okazis je la 28a de decembro 1963.

## LA FRATOJ DE LA KARITATO


Vi ne tre malofte renkontas Fratojn de la Karitato. Kial ekzistas ili? Kia vivo estas ilia? Kion faras ili en Kanado? Eble vi estus scivolemaj pli koni pri tiuj temoj: mi do provos respondi ĉi-tiujn demandojn.

KIAL EKZISTAS ILI? Fondita en 1807, en Gand, Belgujo, de kanoniko Pierre-Joseph Triest, tiu Instituto, jam de la komenco, volas helpi la mizerulojn, kie aŭ kiaj ajn ili estas. Post la franca Revolucio, grandnombregaj mizeroj, kiel ŝankro, malkuraĝigadis kaj rodadis la animojn de tiuj kompatindaj kamparanoj kaj urbanoj, disŝiritaj pro domaroj ruinigitaj, pro filoj kaj edzoj mortantaj, kaj pro iaj personoj stultigitaj de tiu terura batalplago. Haladzaj malsanulejoj kaj malliberejoj vokegis fruan helpon, kaj tiu grandanima kanoniko respondis la plej eble el bone. Inter aliaj ellaboraĵoj, Triest, - nomita la belga sankta Vincent de Paul - vokis kelkajn bonvolajn junulojn, ne senfrukte. Kadukulojn kaj malsanulojn ili prizorgis, kaj post iom da tempo, multe da malriĉaj infanoj povis ricevi instruadon kaj pli bonan edukadon pere tiuj Fratoj.

KIA VIVO ESTAS ILIA? Dum almenaŭ sep jaroj, la aspirantoj preparas sin por la posta apostolado, en specialaj lernejoj, kiel Juvenato, Postulado, Noviciato. Post la unuaj votoj, unu daŭrigas siajn studadojn por instrui, aliaj por flegi. Pere de flegado kaj instruado, la Fratoj celas pliproksimiĝi al Dio siajn ĉiujn protektitojn. Oferema karito, de matene ĝis nokte! Sed vivo kiom bela, kiam oni pensas, ke aliuloj estas pli feliĉaj per onia agado. Ne ĉiam facila programo en grupa vivo kaj en sendankaj laboroj, sed Dio helpante, kiom da bono oni povas fari!

KION FARAS ILI EN KANADO? Jam de 1865, tiuj Fratoj sin dediĉas en Kanado, unue por junaj malliberuloj kaj poste por malsanuloj, en Montrealo. Krom la formiĝo-lernejoj, kiel en Kebeko, ili instruas en kelke da urboj kaj vilaĝoj, kiel Sorel, Drummondville, Sherbrooke, Saint-Ambroise (Chicoutimi) ..... Ili rulas la konatan Mont-Saint-Antoine, reeduka kaj samtempe teknika lernejo. Ili prizorgas du malsanulejojn por maljunuloj kaj mensmalfortuloj, unu en Montrealo kaj la alia, en l'Annonciation (Hôpital des Laurentides). La Kanadaj Fratoj ankaŭ prizorgas teknikan misio-lernejon en Comas, Peruo, ĉirkaŭ ses mejlojn proksime al Lima: malriĉega antaŭurbo, kie vegetas 120,000 "vilaĝanoj" aŭ "loĝejaĉanoj". Antaŭe la Fratoj havis komerco-lernejon en Kubo, sed la Castro-programo malfeliĉe forpelis la misiistojn.


Frato Vianney, f.c.



# KRUCVORTENIGMO

De: Vincent Beaupré


## HORIZONTALE



1 - Oficialajn Raportojn -
2 - Pere de Antikva ĉordo-muzikilo (inv) - Uzata por teksi ŝtofojn (adv)
3 - Prefikso - Forte - Membro de grupo - en iu loko
4 - Sufikso Esprimanta abstraktan ideon - Nedifina pronomo - Kondiĉe Ke - Thomas-L, Mann -
5 - Esprimo de la vizaĝo - En Erupcio
6 - Nutraĵo el la Kokino (Pl) Sufikso signifanta vivantan estaĵon - Pere de la Koro
7 - Granda Platboato por transporti veturilojn K.T.P.
8 - Ludkartoj kun nur unu punkto - En farita - Kontraua
9 - Lacige - Transformi la bestan felon en ledon (Inverse)
10- En imiti - Peter Fanueil - Prepozicio signifanta disdividon - utileco (Inverse)
11 -Persona pronomo - En scii - En fari - en nur -
12 - Rifuzas (inverse) Duono de Telefono -
13- Aparatoj por fiksi Kandelojn.

## VERTIKALE

1 - Ekskluziva privilegio - 2 - Pere de Vico (Inverse) - Desjeti grajnojn sur tero - 3 - Prefikso montranta ripeton - lirika poemo - en klopodi - Sherwood Anderson - 4 - Adverbo signifante "Pli ol sufiĉe (inverse) - Otto Jesperson - Komuna prepozicio - En policano - 5 - Movi iun au ion al si - membro de la korpo (apos) - 6 - Grasa Fluaĵo - Moviĝu de iu loko al alia (inverse) laste - 7 - Senreliefa - 8 - Vulgara nomo de la natria Klorido por gustigi manĝaĵojn (inverse) korinplino (inverse) - uzi eksplojetilon, celante vundi au mortigi iun - 9 - uzata porteksi ŝtofojn (adv) - flavan metalon - 10 - Frankcio - Prefikso signifanta nomentan Agon - pronomo - Sufikso - 11 - Komuna prepozicio - Adverbo signifanta "pli ol sufiĉe" - membro de grupo - Du similaj vokaloj - 12 - Antauenirigi objekton turnante ĝin ĉirkau ĝi mem (inverse) - En lazuro - 13 - Grado de varmo.



<---- Solvo de La nuna problemo